

# ESPERANTISTO

ORGANO DE ASOCIO DE ESPERANTISTOJ EN SLOVAKA SOCIALISMA RESPUBLIKO

Jaro. 1981

DECEMBRO

Numero 12

## SEL - POR KIU?

Ĉi-jare okazis du Someraj E-Lernejoj - SELKO /en Dedinky/ kaj SELE /en Eger/. Partoprenis en ili kune 215 gekursenoj, el kiuj 165 /= $76,7\%$ / ricevis diplomon. El tiuj 165 estis el SSR 7 en SELKO, 33 en SELE, kune 40 - do  $24,2\%$ . El tiuj 40 partoprenis 13 /= $32,5\%$ / en la kurso A /por komencantoj/, la ceteraj 27 /= $67,5\%$ / en la kursoj B, C, D. Do la 13 estas novaj adeptoj, komencintoj, kaj nur la 27 fakte plialtigis sian lingvokonon.

Ni jam kelkajn jarojn ripetadas la frazon pri la neceso plialtigi nian lingvan nivelon, sed neglektas la bonegan eblecon fari tion. Ĉi-jare plialtigis sian lingvonivelon en SELOj 27 gesanoj el Slovakio - do ne plenaj 2% de la numero de adeptoj.

- elinte  
Evident-  
tau ĉio

Kiu k...  
el la la...  
partopre...  
tio kul... ni mem, antau ĉio  
la kluboj kaj rondetoj, ĉar ili neglektas la SELOjn kaj ne profitas ilin por la progresigo de siaj geanoj.

Iam la celo de SELOj estis: generale ebligi al interesuloj lerni Esperanton kaj/au perfektigi en ĝi. Sed ĉio evoluas, do ankau la ideo de SELOj kaj ilia celo. Hodiau ni venas al la opi-

nio, ke SEL devus esti nur perfektigejo. Tio signifas, ke estas dezirinde, ke en SELOj eĉ ne plu estus la kurso A - kurso por komencantoj, kiu - cetero - pro la diverslingveco de la gekursenoj kaŭzas problemojn ĉe la instruado. Sekve, en SELOj estus nur la kursoj B - konversacia, C - kompletiga, D - seminario /+ prepero al la ekzameno pri instrukapablo.

El tio rezultas, ke la kurso A - por komencantoj - devus esti translokigita en la klubojn kaj rondetojn; ĉi tie la adeptoj akirus la bazajn konojn, en la B-kurso de SEL la adeptoj ekzercus praktike la parolan uzon de la lingvo lernita en la bazaj kursoj, en la C-kurso prepariĝus siajn lingvojn, en la D-kurso, kiu havas seminarian karakteron, ili akirus pli profundan scion pri la problemoj de la lingvo kaj movado, kaj prepariĝus por la ekzameno pri instrukapablo.

Ke la ideo fariĝu realaĵo, tio estas la tasko de niaj rondetoj kaj kluboj. Ĉiu nia klubo kaj rondeto zorgu, ke ĝi havu - kaj se ĝi ne havas, ke ĝi havigu aŭ eduku al si tauga/j/n kursgvidanto/j/n, kiu/j/ en serioza/j/ kurso/j/ por komencantoj preparos la partoprenontojn por la B-kursoj en SELOj. Kaj estos la tasko de la kluboj kaj

rondetoj multe pli intense instigi siajn ganojn al la partopreno en la pli altaj kursoj de SELoj, kiujn ili mem proprafor-te ne povas okazigi, kaj tiel plenumi la asocian taskon: plialtigi la lingvonivelon de nia anaro. Tiel ankaŭ la kluboj kaj rondetoj akiras lingve pli spertajn ganojn, kiuj estas pli kapablaj aktivaj en la klubo aŭ rondeta vivo, aŭ fari la ekzamenon pri lingvokono aŭ instrukapablo.

Kompreneble, ankaŭ la organizantoj devus oficiale akcepti

la ideon kaj oficiale forigi la kurson A el la strukturo de SELoj. Se ili tion faros, SELoj plialtigos sian kvaliton kaj fariĝos laboratorioj de la lingva progreso, en kiuj la diver-nacieco de la partoprenantaro ne plu estos bremsilo, sed pozitiva trajto, kaj la SELoj fariĝos pruvejo de la kvalitoj de Esperanto pli ol ĝis nun.

Kion diros pri tio ĉi la organizantoj de SELoj - kaj kion la E-kluboj kaj rondetoj, ja eĉ la unuopuloj?

VeGa

## ILEI

### INTERNACIA LIGO DE ESPERANTO-INSTRUISTOJ

S-ano prof. Ingusz el Budapeŝto, vicprez. de ILEI kaj respondeculo pri ties sekcioj en socialismaj landoj, kaj lia edzino vizitis en oktobro esperantistojn en Košice.

Dum amika kunesto kun Košicanoj s-ano Ingusz informis ilin pri la celoj kaj agado de ILEI. El liaj vortoj ni jen donas la ĉefajojn:

La celoj de ILEI estas atingi, ke en laŭeble plej multaj landoj Esperanto estu oficiale aŭ fakultative instruata en la lernejoj, kaj doni helpon al E-instruistoj, ke ili povu sukcese instrui Esperanton.

La ĉefa gvidorgano de la Ligo estas la komitato, kiu kunvenadas ĉiujn tri jarojn kaj havas la rajton elekti por la tri jaroj la estraron. La estraro konsistas el 5 personoj, ĉiu el alia lando. La nuna prezidanto de ILEI, rektoro Hel-muth Sonnabend, estas el FRG, la ĝenerala sekretario d-ro Mario Dazzini el Italio, la sekretario estas el Hispanio, la finan-ca respondeculo el Svedio, kaj la vicprezidanto el Hunga-rio. ILEI havas en 35 landoj

landajn sekciojn, el kies delegitoj konsistas la komitato. Ĉiujare ĝi okazigas konferencon, la lasta estis ĉi-somere en Gö-döllő /Hungario/. Laŭ la opinio de la partoprenintoj la konferenco estis tre sukcesa kaj ri-ĉa je kulturaj programoj. Bedaŭ-rinde, s-anoj el Slovakio ne partoprenis, ĉar Slovakio ankoraŭ ne havas apertan ILEI-sekcion.

Kiel memstara esp-ista organizaĵo, ILEI havas interkonsenton kun UEA pri kunlaboro sur la kampoj de edukado kaj instruado. Ĉe UNESCO en Parizo ILEI havas konstantan reprezentanton.

ILEI efektivas la kunlabo-ron inter diversaj landoj en la spirito de la Helsinkia Deklaracio.

La sekretario de nia Klubo, s-ano Kucin preparis al ni vere amikan medion, en kiu post la interesaj vortoj de s-ano prof. Ingusz sekvis vigla amika interbabilado.

Eva Benická

## PER SALO KAJ PANO,

kiel postulas la malnova glava kutimo, akceptis la bratislavaj geespistoj la gastojn, kiuj alvenis partopreni la renkontiĝon B-B-B (Bratislava-Brno-Budapesto). La renkontiĝo estis vere internacia. De la 16a ĝis la 18a de oktobro 1981 oni povis en Bratislava diverse loko vidi la gepartoprenantojn, apartenantajn al kvin naciecoj (1 Bulgaron, 34 Hungarojn, 1 Japaninon, 12 Ĉeĥojn kaj 36 Slovakojn) - entute 85. La estraron de AESSR reprezentis ĝia prezidanto s-ano ing. Milan Zvara.

Vendrede, la 16an de oktobro oni prezentis al niaj gastoj kulturen programon. Dum la programo prezentis sin i. a. la amatora folkloro ensemblo "Dopravár" (=Trafikisto), kaj pri siaj sciencaj priesperantaj esploroj informis s-ano Stanislav Košický kaj laboranto de Pedagogia esplorinstituto s-ano Eduard Gašinec.

Sabate la B-B-B-anoj travigardis la urbon; ŝiĉeronis s-anino Zuzana Bednaříková.

Vera ĝuo estis aŭdi la fakan klarigadon de arkeologino d-rino Veronika Plachá pri la kastelruino Devín apud Bratislava. La klarigadon tradukadis s-anino Z. Bednaříková.

Vespere la gepartoprenantoj amuziĝis en restoracio ĉe muziko.

Pri agrabla restado de la partoprenantoj zorgis teamo de bratislavaj volontuloj frunte kun s-anino Zlatica Listopadová, prez. de la Urba komitato de AESSR en Bratislava.

Ni bratislavanoj dankas al la budapeŝta kaj brna grupoj, ke ili venis en nian urbon tiel multnombre. Ne havante idealajn kondiĉojn, ni provis kompensi la mankojn per la entuziasmo de volontuloj. Ni esperas, ke niaj gastoj sentis sin ĉe ni bone.

Ing. M. Hysko

## Bratislava

En la Baza nauĵara lernejo por handikapuloj (str. Mokrohájka) en Bratislava s-anino Alica Komlóšiová gvidas ekde septembro E-kurson por dekdu 14-15-jaruloj, kiuj nomas sian rondeton "Espero".

(BEKO)

## SOLENA KVARONJARA PLENKUNSIDO

La 5an de novembro 1981 okaze de la 64a datreveno de GOSR, aranĝis EK Košice, kune kun ĈSD Uzlový klub - Fervojista klubo, solenan kunvenon, kiun partoprenis proks. 50 geanoj kaj gastoj. Malfermis ĝin s-ano Beňo, estro de la Fervojista klubo. Post la solena parolado sekvis altnivela programo, kiun prezentis la Slovaka Ŝtata Teatro en Košice, infanoj de bazaj lernejoj kaj 30-ana Ĥoro de la maŝinfabrika ZTS. Nome de EK parolis s-ano D. Papák pri la komunaj celoj de la proleta internaciismo kaj la E-movado.

Post la solena parto de la programo s-ano Kucin, la sekr. de EK, informis la ĉeestantojn pri la laboro de la Klubo dum la pasinta somero, pri SELKO kaj SEF en Bulgario, pri la sukcesa agado de kursgvidantoj dum la pasinta lernejararo kaj pri la internaciaj kontaktoj de la geanoj en la somera libertempo. La paroladon sekvis vigla diskuto.

## E-KURSOJ EN KOŠICE

En la lernejararo 1981-1982 komen-  
ciĝis en Košice E-kursoj ĉe

Kleriga Centro L-II

gvidas s-aninoj Černáková, Kozá-  
ková,

Klubo de pensiuloj

gvidas s-ano Bodenlos,

Baza lernejo, Požiarická

gvidas s-anino Gorejová,

Baza lernejo, Tomášikova

gvidas s-anino Očičová,

ZVAK (Akvoekonomia entreprenon)

gvidas s-ano Zachariáš,

Kleriga Centro Horná

gvidas s-anino Benická,

CSEMADOK

gvidas s-anino Benická.

EB

## NOVÁ DUBNICA

S-anino Vlasta Horáková, lernej-  
estrino, gvidas ekde oktobro 1981 en  
Domo de pioniroj kaj junularo en N.  
Dubnica kurson por 9 junaj partopre-  
nantoj.

Lčka

# ANTAŬ 60 JAROJ

/La 13a UK en Prago/

Mi ricevis interesan hungarlingvan artikolon de s-ano Imre Szenes, ĉefredaktoro de la periodaĵo Világ és Nyelv (Mondo kaj Lingvo). La aŭtoro de la artikolo supozas, ke niajn legantojn povas interesi ĝia temo, tial mi tradukis kelkajn partojn de tiu artikolo.

En aŭgusto 1981 estis la 60a datreveno de la 13a UK. Ĝi estis organizita en Prago. Nur malmultaj, precipe la pli aĝaj memoras la antaŭulon de la nuna UNO - la Ligo de nacioj. Mi volas konatigi al niaj legantoj la dokumenton de la ĉefsekretario de la Ligo de nacioj, kiu estis akceptita en la j. 1922.

"La Ligo de nacioj ekde sia fondiĝo ricevas senĉese leterojn, kiuj postulas la akcepton de helplingvo, precipe de Esperanto. Tiu lingvo jam disvastiĝis en multaj landoj kaj estas instruata en diversaj lernejoj. La proponoj estas ekzamenitaj fare de la ĉefsekretario, ĉar la proponoj volas forigi la lingvajn barojn, kiuj malfaciligas la internaciajn rilatojn inter popoloj en la scienco, komerca, fremdultrafika kaj filantropa fakoj, kaj ĉefe en laboristaj medioj."

Do la Ligo de nacioj jam en 1920 okupiĝis pri la propono enkonduki Esperanton en lernejojn, ĉar tiu propono estis subtenata de 14 ŝtatoj, inter ili ankaŭ de la Ĉeĥoslovaka respubliko. La afero ege interesis la vicĉefsekretarion de la Ligo de nacioj, la Japanon d-ron Nitobe, kaj li oficiale partoprenis la 13an UK, kiu okazis en Prago. Post la referaĵo de d-ro Nitobe pri la Kongreso, la Ligo de nacioj ebligis kunvoki en Ĝenevo konferencon, kiun partoprenis ne nur la ŝtatoj-anoj de la Ligo, sed ankaŭ tiuj ŝtatoj, kiuj ne estis ĝiaj membroj, i. a. Sovetunio. Multaj tiamaj famaj verkistoj, scienculoj, akademi-anoj kaj politikistoj sendis al la Ligo de nacioj subtenajn deklarojn pri la menciita temo.

Tiel prepariĝis riĉa dokumentaro al la interna raporto de la ĉefsekretario, kiun prezentis la japana ĉefsekretario. Tiu ampleksa raporto estis pozitiva kaj konvinka favore al la enkonduko de Esperanto en lernejojn. Por pruvi la autentikecon de la faktoj, la raporto konatigis la disvastigitecon de Esperanto en diversaj kandoj. La resumo pri Ĉeĥoslovakio enhavas i. a. jenajn faktojn: la dekreto de Ministerio pri kulturo kaj edukado aprobis la instruadon de E. en ĉiuj lernejoj, kie estas je dispono ekzamenita instruisto. En la lernojaroj 1920-21 oni aprobis la instruadon de E en 15 bazaj, 3 mezaj kaj 1 teĥnika mezlernejoj. La Ministerio konsentis pri la eldonado de E-lerolibroj. Aperis 15 lernolibroj kaj 6 vortaroj. La instruado de E estis fiksita je du horoj semajne.

En Ĉeĥoslovakio E. ege disvastiĝis. /.../ La 13an UK patronis la ŝtat-estraro. /.../ En Ĉeĥoslovakio aperadis 8 E-periodaĵoj. La raporto de la Ligo plurfoje menciis la situacion en Ĉeĥoslovakio kaj i. a. skribas jene: "Kiam nia vicĉefsekretario partoprenis la pragan E-kongreson, kiun ĉeestis proksimume 2500 homoj el preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo, li miris pri la noble spirito kaj humanisma entuziasmo. Oni devas konfesi, ke la delegitoj de unuopaj ŝtatoj esprimiĝis per mirinda facileco kaj rapideco kaj komprenigis sen interpretistoj. Apartan efekton havas en tia komunlingva konferenco la manifestado de unueco kaj egaleco. Ĉiuj estas egalrajtaj. Ekzistas oratoroj, kiuj senprepare elok-

vente parolas Esperante."

La laboristaj movadoj de multaj ŝtatoj jam ekde komenco favoris Esperanton, la plej bonan rimedon de internaciismo kaj internaciaj kontaktoj. Por la internacia laborista movado havis la raporto de la Ligo de nacioj grandan signifon kaj estis dokumento de grava internacia lingvo-politika aspekto.

La nuntempa E-movado en la mondo travivas novan fazon de sia ekzistado. La vojo ĝis nun estis malfacila. Nur malrapide estis rebonigebla la malprogreso de la movado, kaŭzita de fa-

ŝismo, la dua mondmilito kaj la longa periodo de malvarma milito. Tamen, en Ĉeĥoslovakio, simile kiel en Hungario, estas perceptebla progreso de la movado, same en Sovetunio per la renovigo de la tutŝtata Asocio en la j. 1979, kaj en Anglio i. a. pere de Esperanta Parlamenta Grupo.

Tio ĉi ebligis, ke la afero de la internacia lingvo estu pritraktita en UNO en la sama spirito kaj kun la sama celo, kun kiu okupiĝis pri ĝi la tiam Ligo de nacioj antaŭ 60 jaroj.

Eva Benická

## ESPERANTO EN LA HUNGARAJ RADIO KAJ TELEVIDO

La esp-istoj, kiuj havas la eblecon aŭskulti la radio- kaj televidelsendaĵojn el Hungario, havis dum la pasintaj semajnoj surprizan ĝojon:

La 27an de oktobro la populara hungara kantistino Zsuzsa Koncz (ĵuĵa konc), bone konata ankaŭ ĉe ni, kantis esperantlingve kaj enkondukis la radioprogramon pri "Rock-muziko kaj Esperanto". En tiu programo universitata prof. s-ano d-ro Szerdahelyi parolis pri Esperanto.

La 8an de novembro s-ano Gyarmathy intervjuis gastojn de SEU (Somera E-Universitato) en la hungara banloko Gyula. La gastoj estis el Skot-

lando, Aŭstralio kaj Nederlando. Memkompreneble temis pri E. kaj en E. Informojn pri la movado al la raportisto donis s-ano d-rino Flóra Szabó-Felső, la ĉefsekretarino de UEA. Ŝi respondis ankaŭ al la demandoj de la vasta publiko, kiu tuj interesiĝis telefone pri la eblecoj lerni Esperanton.

La 15an de novembro oni denove povis aŭdi kelkajn eminentajn esp-istojn kaj vidi modernan E-studhoron, kiun gvidis s-ano Jozefo Horváth, la aŭtoro de la lernolibro "Esperante en 30 tagoj".

Eva Benická

## IFER 82

Ekde la 12a ĝis la 14a de marto 1982 okazos en Leipzig, la dua plej granda urbo de GDR, urbo de internaciaj foiroj, la Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo "IFER 82". Sub la ĝenerala temo "Goethe-Faust - Leipzig" ni aranĝos por vi atrakcian programon, en kiu estos ankaŭ interkonatiga vespero, librobazaro, urborigardado, dancado.

Senprokraste petu programon kaj aliĝilon ĉe: Kulturbund der DDR, Organiza komitato de IFER, 7010 LEIPZIG, Käthe-Kollwitz-Strasse 115, GDR.

## JES

### JUNULARA ESPERANTO-LERNEJO

okazos de la 4a ĝis la 17a de julio 1982 en Bardejov. Organizos ĝin JES kun E-klubo en Martin. Programo tipe porjunulara: Trigradaj kursoj, feriado kun multe da emuzo, ekskursoj, banado en termala akvo, dancamuzoj, internacia junulara etoso.

Aĝlimo: 30 jaroj, kotizo: 800,- (eksterlandanoj 1000) Kčs.

Aliĝi vi povas jam nun ĉe: Stano Marček, Zvolenská 15, 036 01 MARTIN.

Lingvaj konsultadoj por la partoprenantoj de kursoj kaj klubanoj dezirantaj plibonigi aŭ refreŝigi sian lingvokonon okazados en la tagoj 16.01., 20.02., 27.03., kaj 24.04. 1982, ĉiam de la 8a ĝis la 13a horo en la Domo de Sindikatoj.

Prelegon por la geanoj de la Komputistika societo faris la 27.10. 1981 en la Budapeŝta universitato s-ano inĝ. Vladimír Nĕmec.

Laborbrigadon ĉe la rekonstruo de la Asocia domo en Poprad - jam la duan - partoprenis 9 geklubanoj la 3an de okt. 1981.

Du kursoj por komencantoj komencigis en septembro kun 35 aliĝintoj. Instruas s-anoj J. Gundáš kaj inĝ. V. Nĕmec.



## ŠAKTURNIRO

pri la migranta pokalo de AESSR okazis la 7an de novembro 1981 en Žilina.

La unuajn 3 lokojn kaj belajn premiojn gajnis: 1. Viktor Cvopa (EK Žilina), 2. Vladimír Gregor (EK Bratislava), 3. Miroslav Salát (EK Žilina).

Antaŭ la turniro okazis la fonda kunveno de Ŝakista sekcio, kiu aprobis la statuton, la laborplanon kaj elektis 3-membran estraron: M. Salát, prez., V. Cvopa kaj Jozef Gundáš, estraranoj.

La kunvenon nome de AESSR salutis kaj la premiojn al la plej bonaj partoprenintoj de la turniro transdonis d-ro Andrej Lukáč, vicprez. de AESSR.

La ŝaka sekcio alvokas ĉiujn klubojn organizi klubajn ŝakturnirojn kaj fondi klubajn ŝaksekciojn.

Venontjare la ŝaka sekcio planas okazigi ŝakturniron en du kategorioj - registritoj kaj neregistritaj ŝakistoj.

Informojn pri Ŝaka sekcio petu ĉe Miroslav Salát, 023 41 NESLUŠA 805.

(Spravodajca+vln)

La 67a Universala Kongreso de Esperanto okazos en la tagoj 24.-31.07. 1982 en Antverpeno (Belgio).

La alta protektanto de la 67a UK estas la belga reĝo Baldueno. La prezidanto de la Loka Kongresa Komitato estas s-ro Ferdinand Piot, senatano, jam pli ol 30 jarojn membro de UEA.

La centra kongresa temo estos: Generaciaj aspektoj de la Esperantomovado.

Unu tuta tago de la Kongreso estos dediĉita al la problemoj de la instruado de Esperanto.

Post Jugoslavio, Bulgario, Svislando kaj Brazilo ankaŭ Belgio eldonos specialan poŝtmarkon honore al la kongreso.

Tuj post la 67a UK (31.07.-07.08. 1982) kunvenos en Loveno (Leuven, Louvain - Belgio) la 38a Internacia Junulara Kongreso. Ĝia ŝefa temo estos: "Scienco kaj socio".

En la tagoj 31.07.-06.08.1982 okazos en Breda (Nederlando) la 50a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj. (UEA)

## ĈEA

La 4a Kongreso de Ĉeĥa E-Asocio

okazos la 19an ĝis 21an de Marto 1982 en Pardubice en la Kultura domo Dukla. Dum la kongreso estos elekto de la novaj asociaj gvidorganoj.

Por la partoprenantoj estos preparitaj kultura programo, balo, tra-rigardo de la urbo, ekspozicio, kunveno kun eksterlandaj gastoj.

La kongreskotizo 95 Kčs inkluzivas vizitojn de ĉiuj programoj, kongresan insignon, vojaĝbiletojn por urbaj publikaj trafikiloj, kongresajn materialojn kaj servojn.

La interesuloj pri partopreno devas nepre jam nun aliĝi ĉe Ĉeĥa E-Asocio, Jilská 10, 110 00 PRAHA 1, ĉefe por certigi al si tranoktojn.

(ĈEA)

ĈU VI ESTAS KONTENTA

pri tio, kion vi en 1981 faris por progresi mem kaj por progresigi la Asocion?

## NITRA

Kun la celo propagandi Esperanton, la EK en Nitra kunlabore kun la organizantoj de porjunularaj programoj en Parko de kulturo kaj ripozo en Nitra okazigis dimanĉe la 15an de novembro 1981 dum junulara amuza posttagmezo paroladon kaj interparolon pri Esperanto. La demandojn de la junularo respondis funkciuloj de la E-rondeto ges-anoj M. Menhart, ing.A. Kolář kaj M. Nemcová. La gejunuloj interesiĝis pri la estiĝo de Esperanto, pri la ebleco lerni Esperanton, pri la E-movado, E-aranĝaĵoj ktp.

En la vestiblo de la Estrada halo de PKR estis samtempe ekspozicio de esperantaĵoj, E-literaturo, korespondaĵoj, afiŝoj... Pri la ekspozicio zorgis kaj informojn al interesuloj donis s-ano J. Hudač, vicprez. de la E-rondeto ĉe PKR.

Tiu ĉi aranĝaĵo estis sukcesa, al la gejunuloj ĝi plaĉis kaj vekis sufiĉe viglan intereson.

Mária Nemcová

## J E S

RENKONTIĜO DE JUNAJ ESPERANTISTOJ okazos de la 7a ĝis la 9a de majo 1982 en hotelo Esperanto en Pribylina. Organizas ĝin JES kunlabore kun JK de ĈEA kaj HEJ (Hungara E-Junularo).

Pli detale pri ĉi tiu kulture-turisma junulara aranĝaĵo vi povos legi en la venonta n-ro de ES. (SM)

## PIEŠTANY

2-tagan "ESPERANTISTAN RENKONTIĜON" preparas Esperanto-klubo Piešťany semajnfine en februaro aŭ marto 1982. Aranĝaĵo konvena ankaŭ por gekursaĵoj-komencantoj kaj familianoj.

Informilon kun detalajoj ricevos ĉiuj interesuloj, kiuj postulos ĝin ĉe la adreso:

Ľudmila Lukáčková, nám. 1. mája 6, 921 01 PIEŠTANY.



Helpu plibonigi ES

- KUNLABORU!

## KARAVANO al la 67a UK

Ĉeĥa E-Asocio preparas karavanon al la 67a Universala Kongreso de Esperanto en Antverpeno. AESSR kunlaboras kun ĈEA en tiu ĉi aranĝaĵo. Kiu el AESSR volas aliĝi, tiu devas tuj sendi al ni skriban aliĝon, en kiu li/ŝi indikos

1. sian plenan precizan adreson
2. la numeron de sia pasporto.

Ĉiu interesulo devas printempe havigi al si eltiraĵon el la registro de punoj.

Oni kalkulas, ke la karavano daŭros 12-15 tagojn kaj vizitos kelkajn landojn (GDR, FRG, B, NL, F, Luksemburgo). La prezo, kiu inkluzivos vojaĝ-kaj restadkostojn kaj la poŝmonon (NE la kongreskotizon!), estos verŝajne 12 ĝis 15 mil Kčs. Laŭ la interkonsento kun ĈEA estas por ni rezervitaj 10-15 lokoj en la aŭtobuso.

AESSR - Organiza fako  
Sobotské nám. 6

058 01


POPRAD

## POR NIAJ INFANOJ

Ljudmila Jevsejeva

*Kuraĝa ansero*

"Ga-ga!" - diras la ansero, -  
"kvankam neĝas sur la tero,  
mi sen botoj legon iras;  
ĉiuj kneboj min admiras:  
"Tiu birdo - sensacio! -  
nudpiedas sur glacio!"



Kiu idioto plantis ĉi tie la arbon?

## ESPERANTISTO SLOVAKA

Orgán Zväzu esperantistov v SSR

Rediguje

Redakčná rada

Zodpovedný redaktor

Dr. Andrej Lukáč

Výkonný redaktor

Eduard V. Tvarožek

Vychádza mesačne

Adresa redakcie:

Eduard V. Tvarožek

Hodžova 51

911 01 TRENČÍN

Administráciu vedie

a objednávky prijíma

Daniel Papák

Švermova ul. 35/I

040 01 KOŠICE

## ESPERANTISTO SLOVAKA

Organo de Asocio de

esperantistoj en

Slovaka socialisma

respubliko

Redaktas

Redakta kolegio

Respondeca redaktoro

D-ro Andrej Lukáč

Plenuma redaktoro

Eduard V. Tvarožek

Aperas monate

Adreso de la redakcio

Eduard V. Tvarožek

Hodžova 51

911 01 TRENČÍN

Pri la administracio

zorgas kaj abonojn

akceptas

Daniel Papák

Švermova ul. 35/I

040 01 KOŠICE

Povoliť Vsl. KNV od-

bor kultúry, tlač.ref.

č. 43/TIAC/1978 dňa

26.06.1978

## Salutis nin

kaj pere de ni ĉiujn  
legantojn de ES:

- s-anino Hella Sauerbrey, partoprenanta la 11an Distrikтан E-Konferencon en Berlin (GDR),

- d-rino Magda Šaturová el la Interlingvistika seminario en Paderborn (FRG),

- ing. M. Zvara, d-ro D. Blanke, M. Lennartz (GDR), d-rino Flóra Szabó, ĝen. sekr. de UEA (H), ing. V. Kočvara, ing. V. Němec (CS) + 2 nelegeblaj subskriboj, el la traktado de funkciuloj de E-asocioj en Bad Saarow (GDR).

Koran dankon al ĉiuj salutintoj!

## KORESPONDI

### DEZIRAS

• Katja Krásteva Kostadinova, 30-j, infankuracistino. A: Str. "N. Rilski" 13, ap. 35, 9850 PRESLAV, Bulgario

• f-ino Grozdanka Nikolova Grigorova, 26-j infankuracistino, A: str. "L. Burgas" 8b, 9850 PRESLAV, Bulgario

• Rajna Nedkova Kuleva, 47-j instr-ino, A: str. "R. Daskalov" 10, 9850 PRESLAV, Bulgario

• Ĥamdi Rafiev, 27-j kuracisto, A: str. "Rakovska" 7A, 9850 PRESLAV, Bulgario

• Dobri Ĥristov Marĉev, 53-j kuracisto-Ĥirurgo, ĉasisto, A: str. "Ĥr. Smirnski" 11, 9850 PRESLAV, Bulgario

• Valentina Dobрева Marĉeva, 23-j akuŝistino, int: ĉt. A: str. "Ĥr. Smirnski" 11, 9850 PRESLAV, Bulgario

• 23-j ing, int: muz E-libroj, insignoj, pm, dez kor k slovakaj gesanoj. A: Sergej G. Tjunov, ul. Podgornaja 9, 455020 MAGNITOGORSK, USSR

• Junajn koresponde-amikojn serĉas membroj de pionira E-rondeto el Praha. Adr.: Helena Volavková, ODPM, Radimova 2, CS-169 00 PRAHA 6, Ĉeĥoslovakio.

• Vajda Ioan, ĉaputa post. 91, 2200 BRAȘOV 1, Rumanio, dez kor k vojaĝemuloj, iŝ pm bk.



"Antaŭ unu horo mia edzo foriris ĉi tien, por atentigi vin, ke vi faras tro grandan bruon..."

ĜOJOPLENAN

KRISTNASKON

kaj FELIĈAN

NOVAN JARON

al ĉiuj

kunlaborantoj

kaj legantoj de ES

deziras

la redaktoro.